

67-a jaro n-ro 197 2026:1

la **lampiro**

Nomo sub la pluvo

Juan Trepiana



*Seja um
esperantista
de carteirinha!*

O Programa Mia Amiko convida todos
seus participantes para se tornarem

Membro Virtual PMA-EASP

É uma modalidade exclusiva para quem
quer vivenciar o Esperanto de forma
prática e conectada.



Faça hoje mesmo
sua inscrição:
mallonge.net/pma-mv

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Plu lumadi
- 5 | **Rakonto**
Nomo sub la pluvo
- 9 | **Kino kaj aliaj artoj**
La filo de mil homoj
- 10 | **Iom da Poezio**
Paŭzo
- 11 | **Lingva angulo**
Eksterlingva verkado
- 12 | **Aktuale**
Usono kaj la armea interveno en Venezuelo (2026): Historia-sociologia prespektivo
- 15 | **por iom pripensi**
Perdi por vivi
- 18 | **Iom da Filozofio**
En Florenca taverno, kun vino, ironio kaj Makiavelo
- 21 | **Iom da gramatiko**
Kvazaŭsufikso *-logi-*
- 22 | **Esplorangulo**
Tri opinioj pri la korelativa reformo
- 24 | **Eltiraĵo**
Virgeco-testo estas konsiderata en Afriko kiel kontraŭhoma turmento
- 26 | **El mia vidpunkto**
Gvideco kaj gvidantoj



67-a jaro n-ro 197 2026:1

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2026

Simpla Membro R\$ 200,00
Subtena Membro R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro R\$ 100,00
Virtuala Membro R\$ 50,00

Plu lumadi

Paulo Sergio Viana

Nova Jaro! Nova vivo, novaj ideoj, novaj proponoj! Ĉu vi pretas, karaj gelegantoj?

La Lampiro siaflanke intencas vige plu lumadi. Ekzemple, por ĉi tiu numero ni havas novaĵon, proponitan de nia kunlaboranto João Otávio Veiga Rodrigues. Li sendis gravan tekston prenitantan el bulteno pri juraj temoj, rilate la kontroladon de virgeco de virinoj en Afriko. Sufiĉe skua kaj terura temo, ĉu ne? Ĉu Esperantistoj povus/devus preni klaran sintenon pri tio?

Persone mi pensas, ke prudenta civitaneco devas esti parto de nia Interna Ideo. Respekto al virinoj, interalie, devas esti de ni klare defendata.

Aliaj interesaj tekstoj troviĝas en ĉi tiu unua numero en 2026. Mi esperas, ke vi ilin ĝuos, pripensos, eventuale kritikis kaj proponos disvolvajn ideojn.

Tia estas la celo de nia kara Lampiro, denove, en la Nova Jaro.

Feliĉon al vi!

ORDINARA JARASEMBLEO



meet.google.com/cfc-jfrk-fao



Dato: 28/feb



Horo: 15h

Nomo sub la pluvo

Juan Trepiana

Rito Simerja revis fariĝi granda matematikisto, sed finfine li enradikiĝis inter senutilaj stampoj en eta poŝtoŝiceja dependeco. Estis Bonaero, 1950, dum la vintro transpiris el la muroj de lia laborejo. De tempo al tempo, sen ke io ajn moviĝu, sonoris eta sonorileto interne de li. Signalo, averto, malforta tintado, kvazaŭ guteto da metalo falus sur vitron. Tiu tintado anoncis la aperon de iu ajn asimetrio. Povus esti papero iomete tordita, stampo klinita, vico ŝoviĝinta dekstren. La sono antaŭis la asimetron mem, kvazaŭ varmeta aŭro tra lia brusto, antaŭsentante la fendon ankoraŭ nevideblan. Poste, la trovita asimetrio...

Li jam antaŭe estis enamiĝinta. Kompreneble li amis sen fizika tuŝo, sentis sen haŭto, sen kontakti. Post kruela vintro, en la unua printempa tago ŝi aperis en la kutima kafejo surhavante veston, kiu lasis la ŝultrojn

nudaj. Tie, sur la haŭto de la maldekstra flanko, aperis eta naskmakulo. Li neniam ĝin vidis. Neniam tuŝis ŝin nek en tiu punkto nek en alia, evidente. La sonorileto sonis en la preciza momento kiam la makuleto aperis antaŭ liaj okuloj, kaj la amo, kiu ĝis tiam superflugis ĝisnunajn simetriojn, malfermiĝis flanken. Tiu nigra punkto sukcesis duigi lian rigardon.

Dume, la tempo en la oficejo faldis sin mem. Iu momento malfermis la sekvan kiel humida petalo. Stampante, li rememoris la infanajn kaheletojn: la devon paŝi ilin tute same, unu kiel la antaŭan — sama premo, sama linio. La sonorileto sonis kvazaŭ ĝi veturus el la infanaĝo ĝis la skribotablo sen perdi eĉ grameton da vibra metalo. Rito Simerja vivis sur Möbius-bendo, tiu magio kiu faras el du randoj unu, same kiel el la flankoj, per sola turniĝo. Tiu mistera topologio, kiun Rito ne konis, kie pasinteco kaj estont-

eco spiras en unu sama fatala faldo.

Unu posttagmezon, elirante el la laboro, li vidis sur parka benko folieton duonite falditan, ne tute, kun unu pinto enpremita, kun flanka plio kvazaŭ vundo. Li prenis ĝin sen pripensi, poste ordigis ĝin perfekte kaj legis: “Esperanto, lingvo por ĉiuj”. Io lin altiris. Li enskriptiĝis: Dek ses puraj reguloj, sen esceptoj. Universo malmilda kiel diamanto, logiko kiun li sentis simetria, redonanta al li perfektan sistemon, pleniganta liajn animtruojn, liajn esceptojn, liajn naskmakulojn kaj liajn malfiksajn kahelojn...

La sonorileto sonis, sed li ĝin sentis kiel ekspansion de la brusto. Li enamigis al la lingvo kun sama intenseco kiel li amis tiun virinon antaŭ la naskmakulo. Kiam Rito lernis disigi la vortojn laŭ silaboj, li malkovris ke Simerja ne plu finiĝas per la seka ridbruo, kiel en la hispana. Io moviĝis en li. La "ha" de la hispana iĝis la "ja" de Esperanto — ne ŝtoneto falanta, sed kvieta noto en simetria skalo. Tio ne estis eraro. Tio estis la regulo. Kaj tiam, paradokse, pro tiu kvietiĝo, pro tiu nova, silenta precizeco, Rito — kies vizaĝo kutimis nur al faldoj de pripenso — eksentis la muskolojn de la buŝo leviĝi sen planoj. Li ridetis. La asimetrio inter la nomo

kiel li ĉiam sentis ĝin kaj la nomo kiel ĝi nun estas, estis ne miso, sed revelacio. Lia nomo, eĉ sen ŝanĝi unu literon, fariĝis alia en la buŝo, kaj li amis tiun kiel strangan teoremon.

Li komencis studi en la malseka kelo de la biblioteko, kie grupo de esperantistoj diskutis pri fonemoj kun endogama fervoro. La ĝusteco de tiu aŭ alia prepozicio, de tiu sufikso, de tiu kunmetita vorto, kaj tiel plu... Ĉiam la sama problemo: fari tion kiel Zamenhof, aŭ eĉ pli bone ol li. La komunikado, la interna ideo, la revo... Tiuj aferoj ne alvenis al tiu kelo de perfektecoj. Rito tuŝis la vortojn kiel porcelanon, kiel perfektajn geometriojn. Tiu arkitekturo trankviligis lin, tiu serpento mordanta sian voston, tiu lingvo parolanta faldita sur si mem en tiu kelo, kvazaŭ letero sen sendinto nek ricevonto.

Kiam li jam povis legi, kiam la lingvpecoj ŝajnis ekkunmetiĝi – ho! – aperis “je”. Prepozicio sen fiksita direkto, uzata kiam preskaŭ neniu alia taŭgis. Minimuma fendo, eta tuŝo. la sonorileto tremetis, milde. Li provis daŭrigi. Sed venis la fina batado: “um”, la sufikso sen signifo, la ĵokero de la kartaro. Por Rito ekzistis nek ĵokeroj nek kartaroj. Lingva naskmakulo, oceano sub

kahelo de iu ajn strata angulo. Makulo apogata de nenio. Tie estis la punkto kie la kristalo ekfendiĝis kaj la enam-iĝo subite rompiĝis. Same kiel kun la virino, la amo falis torde al unu sola flanko. La folieto fine ankaŭ tremis inter liaj fingroj kaj poste falis inter velkintaj petaloj.

Kaj la vivo daŭris kiel ĉiam, evitante akvo-truojn, paŝante sur la kahelojn kun precizeco preskaŭ preĝa, lernita kaj ripetata. Inter simetrioj kaj nask-makuloj. Inter klopodoj kaj timoj. Ĉio antaŭeniris en tiu obstina ritmo, kva-

zaŭ ĉiu tago ripetus la saman linion.

Plurajn jarojn post iu malsukcesa simetrio, nokte de tempesto, kiam la internaj sonoriloj fariĝis tre intensaj, li sentis ke li lasis nesigelitan dokumenton en la oficejo. Estis certeco, destino, fatala ciklo: li serĉis sian pluvombrelon. Komence ĝi ŝajnis malgranda, preskaŭ senutila, sed tuj kiam li paŝis en la straton, la pluvombrelo ekkreskis. Ĝi kreskis kiel malseka besto, spirante, leviĝante super li, ŝveliĝante, streĉiĝante, dilatiĝante kiel giganta pulmo. Ĉiu vento-blovo ĝin vastigis.



Ĉiu paŝo estis ondo. La volupto de la kresko envolvadis lin tute.

La sonoriloj ĉesis esti sonoriloj. Ili fariĝis kolumnoj de sono. Vertikala erupcio supreniranta laŭ liaj kruroj, lia brusto, lia nuko. La mondo samtempe faldis sin kaj malfaldis sin, kiel senfina haŭto spiranta sur si mem, neregule pulsanta.

Kaj tiam okazis: li paŝis sur mal-fiksan kahelon. La akvo ŝprucis al unu sola flanko, malvarma. Subita asimetria ŝpruco! La ekpuŝo renversis lin. Li falis dorsen kun milda, malrapida glitado, kvazaŭ la trotuaro sin transformus en korpon lin akceptantan. En la sama momento kiam lia nuko tuŝis

la pavimon, Rito vidis sin de ekstere. Sen tranĉo, sen interrompo. Staranta kaj morta samtempe. La kuŝanta korpo estis griza korpo, ankoraŭ vibranta, englutata de sia propra ombro sur la asfalto.

La homoj alproksimiĝis, konfuzo, senorde, nesimetrie, por helpi. Li ridis starante. Lia rido eksplodis en humidaj muzikbronzoj. Humida muziko de bronzoj, de kordoj, de gigantaj sonoriloj kaj timbaloj. Ĝi estis formo de humida lumo kreskanta en lia nova korpo, neniam haltanta, ridante per tondro-rido, superfluante.

Rito, dorsen al la sceno, paŝis asimetrie al vojo sen reveno.



Mi revenis

Frato Jakobo | Chico Xavier

Tradukis:
Maria Nazaré Laroca

easp.org.br/butiko

La Filo de Mil Homoj

Anna Lobo de Carvalho

Originala nomo: *O Filho de Mil Homens*

Direktoro: *Daniel Rezende*

Aktoroj: *Rodrigo Santoro, Jhonny Marsaro, Miguel Martines e Rebeca Jamir.*

Dramo - Brazilo, 2025

Ĉi foje mi volas prezenti al vi unu el la plej kortuŝaj filmoj kiun mi spektis lastatempe. Temas pri filmo bazita sur libro, kiu havas saman nomon – La Filo de Mil Homoj. La libro estis verkita de Valter Hugo Mãe, kaj la filmo estis reĝisorita de Daniel Rezende.

Oni povas certe diri, ke la filmo tenas la poeziecon de la originala libro. Kaj ankaŭ mi rimarkas, ke tiu estas unu el la esceptoj en kiu la filmo estas tiel bona kiel la libro – malsame ol la kutimo, ĉar libro ofte estas pli bona ol ĝia filmo.

En la filmo, nia Rodrigo Santoro ĝenie stelas kiel Krizostomo – soleca fiŝkaptisto, kiu ĉiam revis esti patro. Lia rutino tamen ŝanĝiĝas kiam li ekkonas Kamilon, orfan infanon, kiu ekvivas en lia domo. Ankaŭ kuniĝas al

ili Isaura, virino kiu fuĝas el doloroj de siaj rilatoj kaj ankaŭ Antonio, kiu serĉas tenerecon kaj akceptemon.

Tiuj historioj interpleksiĝas hazarde kaj je tre kostuŝa maniero. Iom post iom, dum oni akompanas la historiojn de tiuj personoj, la afero iĝas io multe pli granda ol ili mem, kuniĝas homoj ĉirkaŭ ili kaj eĉ homoj, kiuj ne plu estas inter ili – Ili malkovras kune la veran sencon de familio, amo kaj sento aparteni al iu grupo.

La filmo, la lokoj, la dialogoj en la filmo, ĉio estas perfekte planita. Oni eniĝas en tre specialan mondon, kaj eĉ la doloro kaj cikatroj beligas la filmon. Mi pensas ke tiu filmo estis farita kun animo, kaj Rodrigo Santoro eniĝis plene en sian rolon de la filmo.

Mi instigas vin lasi vian poŝtelefonon flanken, kaj spekti tiun filmon kun atento, sen hasto... Gustumante ĉiun parton de tiu filmo, kiu estas vera poezio. Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

Paŭzo

Maria Nazaré Laroca

En ĉi tiu sanktejo
dum kelka tempo
mi fermas la bruan
fenestron de l' mondo.

Verda silento
direktas la trilon
de agordaj birdoj.

Arboj multaj
gracie preparas
nevideblan
baleton.

Ĉe lago ludas
familioj de anasoj,
kaj fiŝoj defias
mallertajn fiŝkaptistojn.

En paŝtejo, bovinoj,
bovoj kaj ĉevaloj,
simple ekzistas.

Kaj do mi fariĝas paco,
trinkante la liberon,
kiu transpasas
ĉi tiun poemon.

Eksterlingva verkado

Luís Euclides dos Santos

Laŭ Vikipedio, "eksterlingva verkado, pli ofte konata en la angla kiel *exophony* (eksofonio) aŭ eksterlingvismo estas la praktiko de (kutime kreiva) verkado en lingvo kiu ne estas ies denaska lingvo".

Kelkaj verkistoj, kiuj kutime verkas en sia denaska lingvo, decidas verki en alia lingvo pro diversaj kialoj.

Antaŭe, unu el tiuj kialoj estis povi atingi pli grandan publikon. Nuntempe, dank' al interreto, oni povas atingi la tutan mondon verkante en iu ajn lingvo.

La elekto de la alia lingvo, en kiu la verkisto verkos, povas esti kaŭzita de diversaj faktoroj: la verkisto lernis la alian lingvon en la lernejo aŭ aŭto-didakte, li aŭ ŝi transloĝiĝis en alian landon pro ekonomiaj kaj/aŭ politikaj kialoj kaj devis lerni la lingvon de tiu lando, k.t.p.

Kiel ĉiuj scias, verki kreive en ies denaska lingvo ne estas facila tasko.

Imagu la malfacilecojn trovitajn de tiuj, kiuj decidas verki kreive en lingvo malsimila al sia denaska lingvo.

Malsupre estas listo de verkistoj, kiuj verkas aŭ verkis (ankaŭ) en lingvo malsimila al sia denaska lingvo.

1) En Esperanto: William Auld, Marjorie Boulton, Julio Baghy, Anna Löwenstein.

2) En la angla: Ayn Rand, Fernando Pessoa, Yiyun Li, Vladimir Nabokov.

3) En la franca: Samuel Beckett, Ágota Kristóf, Milan Kundera, Aki Shimazaki.

4) En la germana: Olga Grjasnowa, Ilija Trojanow, Yoko Tawada, Saša Stanišić.

5) En la japana: Hideo Levy, Yang Yi, David Zoppetti, Li Kotomi.



Usono kaj la armea interveno en Venezuelo (2026): Historia-sociologia perspektivo

Patrícia Guerra

Ĉi tiu artikolo analizas la militan intervenon de Usono en Venezuelo en 2026 el histori-sociologia perspektivo, laŭ lastatempaj eventoj kaj strukturaj tendencoj en hemisferaj rilatoj. Ĝi uzas empiriajn informojn el ĵurnalistaj fontoj, fakulan analizon kaj historiajn datumojn pri antaŭaj intervenoj, kaj diskutas la sociekonomiajn kaj ideajn efikojn de ĉi tiu ekstera agado. Ĝi argumentas, ke la usona interveno reprezentas eskaladon de klasikaj intervenismaj praktikoj enradikiĝintaj en hemisfera imperiismo, kaj ke ĝiaj sociaj kaj politikaj efikoj resonas kaj ene de la venezuela ŝtato kaj en regionaj dinamikoj.

La rilato inter Usono kaj Venezuelo estis markita de cikloj de kunlaboro kaj konflikto dum la 20-a kaj 21-a jarcentoj. Kiam venezuela nafto fariĝis strategia por Washington en la 1920-aj

kaj 1970-aj jaroj, investoj kaj ekonomia influo plifirmigis ambiguajn ligojn inter la landoj. Tamen, la ŝtatigo de la venezuela naftoindustrio en 1976 konsistigis turnopunkton, simbolante la strebon al energia suvereneco kaj foriron de la usona dependeco de la naftosektoro.

Komence de 2026, Usono gvidis militan operacion sur venezuela teritorio, kiu rezultigis la kapton de prezidanto Nicolás Maduro en Karakaso – priskribita kiel la plej granda interveno en Latinameriko ekde Panamo en 1989.

Ĉi tiu artikolo esploras ĉi tiun intervenon per du analizaj lensoj: (1) la historia, konsiderante kontinuecojn kaj rompojn en usonaj intervenismaj politikoj; kaj (2) la sociologia, fokusante sur la sociaj, politikaj kaj kolektivaj identecaj sekvoj en Venezuelo kaj Latinameriko.

Historia Kunteksto kaj Trajektorio de la Rilatoj inter Usono kaj Venezuelo

Naftorilatoj

Ekde la efektivigo de la Hidro-karbona Leĝo de 1943 kaj la posta ŝtatigo de la naftoindustrio en 1976, Venezuelo celis pli grandan kontrolon super siaj naturaj rimedoj, reduktante la partoprenon de usonaj kompanioj. La eksproprieto de fremdaj aktivaĵoj en la energia sektoro plifirmigis rakonton pri nacia suvereneco, kiu influis postajn politikajn streĉiĝojn.

Ĉe la komenco de la 21-a jarcento, kun la prezidanteco de Hugo Chávez (1999–2013), la konflikto kun Usono intensiĝis, markita de kontraŭimperialisma retoriko kaj latinamerikaj integriĝaj projektoj alternativaj al usona hegemonio. La rekono de Juan Guaidó kiel provizora prezidanto fare de la usona administracio inter 2019 kaj 2024 – meze de pridisputataj balotaj disputoj – ekzempligis la instrumentigon de venezuelaj politikaj krizoj en la eksterpolitika tagordo de Washington.

En la jardeko antaŭ 2026, la usona registaro akumulis ekonomian kaj juran premon sur la reĝimo de Nicolás Maduro, inkluzive de sankcioj kaj akuzoj pri "narkoterorismo" kiel pravigo

por trudaj agoj. Ĉi tiuj strategioj estas parto de repertuaro kiu kombinas senkompromisan diplomation kaj juran agadon, ofte observatajn en usonaj eksteraj politikoj kontraŭ registaroj konsiderataj strategiaj kontraŭuloj.

En januaro 2026, la usonaj armetrupoj faris militan operacion en Karakaso, kiu kulminis per la kapto de prezidanto Nicolás Maduro. Ĉi tiu ago estis oficiale pravigita sub la akuzo de drogkontrabando kaj transnacia terorismo. Kvankam iuj sektoroj en Usono vidas subtenon por la interveno kiel manieron kontraŭbatali transnaciajn minacojn, esplorado indikas disigon de opinioj inter usonaj civitanoj.

La interveno ne limiĝas al agado kontraŭ drogkontrabando. La transpreno de la venezuela naftoproduktado ankaŭ fariĝis eksplicita kolono de la politiko de Washington, kun publikaj planoj kontroli kaj eksporti milionojn da bareloj da venezuela nafto al la internacia merkato.

Ĉi tiu kunfluo de intereso – sekurecaj, ekonomiaj kaj hegemoniaj – resonas kun retorika revivigo de la imperia hemisfera doktrino (ekz., la moderna reinterpreteto de la Doktrino Monroe).

(Daŭrigota sekvapaĝe)

Sociologia Analizo: Internaj kaj Regionaj Sekvoj

Historie, la ĉeesto de eksteraj minacoj emas plifortigi kolektivajn identecojn kaj mekanismojn de interna solidareco – eĉ en dispolusaj socioj. En la venezuela kazo, por-Maduraj sektoroj uzis la rakonton pri eksterlanda interveno kiel mekanismon por politika plifortiĝo kaj rezisto kontraŭ la okupado, instigante diskursojn pri suvereneco kaj kontraŭ-imperiismo.

Internaciajuraj fakuloj rigardas la intervenon kiel malobservon de la normoj sanktigitaj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj la principo de ŝtata suvereneco. Ĉi tiu percepto negative influas la legitimecon de la ago sur la tutmonda scenejo kaj implicas malfidon je internaciaj administraj institucioj. Najbaraj landoj vidas ĉi tiun intervenon kiel danĝeran precedencon por nacia suvereneco en la regiono.

La konfisko de energiresursoj kaj la subita ŝanĝo en regado povas generi profundajn sociekonomiajn efikojn: malorganizado de ŝtataj strukturoj, pliigitajn sociajn streĉiĝojn kaj loĝantarojn delokiĝojn. Ĉi tiuj dinamikoj plifortigas malegalecojn kaj pligrandigas kolektivan suferon, ripetante historiajn ŝablonojn de trudaj agoj, kiuj malstabiligas delikatajn sociajn strukturojn.

Konkludo

La usona interveno en Venezuelo en 2026 estas multifaceta fenomeno, kiu esprimas strategiajn, ekonomiajn kaj socipolitikajn interesojn. Historia-sociologia analizo montras, ke kvankam pravigita sub sekurecaj pretekstoj, la ago resonas kun historiaj tradicioj de interveno kaj hemisfera imperismo. Ĝiaj efikoj transcendas la militistan sferon, influante institucian legitimecon, socian kohezion kaj internaciajn rilatojn en Latinameriko.

La epizodo elstarigas la bezonon de kritika pripensado pri la normoj de internacia juro, konfliktsolvaj mekanismoj kaj la rolo de grandaj potencoj en formado de la nuntempa tutmonda sistemo.

Bibliografiaj referencoj

- Agência Brasil. Latinameriko estas sub la povo de usona interveno, laŭ analizistoj. (2026).
- CNN Brasil. Usono citas la invadon de Panamo en 1989 por pravigi agon en Venezuelo. (2026)
- The New York Post. Plimulto subtenas usonan militan intervenon en Venezuelo. (2026).
- The Guardian. Venezuelo daŭre liveros petrolon al Usono 'senfine'. (2026).
- Time. Kio Okazas Kun Usono kaj Venezuelo, Klarigita. (2026).
- Vikipedio. Usono implikiĝo en la naftoindustrio de Venezuelo. (2026).
- Wagner Menezes et al., Por profesoroj ĉe FDUSP, usona invado de Venezuelo malobservas aspektojn de internacia laŭleĝeco. (2026).

Perdi por vivi

Milton Paulo de Lacerda

Gazetoj kaj radiostacioj ĉiutage alportas novaĵojn kiel ĉi tiun: “Aŭto de tia kaj tia marko, tia kaj tia jaro kaj tia numerplato estis ŝtelita; bonvolu sciigi tiun-ĉi-tiu-n ĉe la telefonnumero tiu-ĉi-tiu.” La informoj, tiel oftaj, apenaŭ plu impresas la averaĝan leganton aŭ aŭskultanton. Sed tiuj, kiuj spertis la dramon propraokule, sentas la perdon de valora havaĵo, malfacile anstataŭigebla, aldone al la ĝenoj kaj limigoj, kiujn ili devis suferi de tiam.

Instruistino, kiu jam “ĵonglis” veturante sian aŭton de unu lernejo al alia por tiel plenumi sian okupatan klashoraron, nun trovas sin en duobla problemo sen sia persona, subite ŝtelita, veturilo. La perdo de amato, kies kompanion oni ĝis tiam ĝuis, estas eĉ pli dolora. Filo, edzino, patrino, patro, proksima amiko, ĉiuj neeviteble mortas. Oni jam ne havas ties ĉeeston, jam ne aŭdas ties voĉon, jam ne spertas ties komforton, jam ne ricevas ties subtenon. Ŝajnas ke kun la perdo de iu, kiu estis unu el la kolonoj de nia

kunekzistado, la konstruaĵo de nia emocia vivo kolapsas. Eĉ pli malbona ŝajnas esti la sperto de malinteresiĝo en momento de krizo, io kio povas okazi en ajna aĝo, precipe en adoleskeco, aŭ en la “krizo de seniluziigo” ĉirkaŭ tridek jaroj, aŭ en la krizo de maljuneco; alivorte, kiam persono perdas la sencon de la vivo, kaj la vivkialo kolapsas.

En nia ĉiutaga vivo, ni konstante perdas. Ni perdas dokumentojn, veturilon, ŝatatajn objekton; ni perdas nian lokon en vico de la superbazaro, nian maldorman tempon, deziratan laborŝancon; ni perdas nian lokon en la universitato, nian amatinon, nian loterion; ni perdas tempon per la sendormeco, ni perdas indicojn dum la esploroj, ni perdas homojn kadre de entrepreno. La problemo ne estas tiom perdi, sed scii kiel perdi. Perdi estas neeviteble. Arboj perdas siajn foliojn en la transiro de aŭtuno por redukti la surfacon lasotan al la venonta vintra malvarmo; ili perdas siajn florojn por

ke bongustaj fruktoj povu veni en ilian bruston; ili perdas siajn proprajn fruktojn por liberigi la semojn, el kiuj kreskos novaj arboj. Se ili insistus pri konservado de sia foliriĉa kanopeo kaj la ĉarmo de siaj floroj, ili povus plaĉi al preterpasantoj bezonantaj ombron kaj amantoj de estetiko, sed ili restus sterilaj... "Se tritika greno ne falas sur la teron kaj mortas, ĝi ne donos frukton" (Jo 12,24).

Perdi estas neeviteble. La cikado deĵetas sian ŝelon por resti viva, lasante ĝin alkroĉita al la trunko de arbo, kvazaŭ monumenton memore al sia renovigo. Reptilioj, kiel serpentoj dehaŭtiĝas, lasante la senutilaĵon laŭlonge de la padoj kiel rubon post monatoj da rampado. Malgrandaj birdoj, kiel agletoj, perdas la komforton de siaj nestoj kaj la privilegion ricevi bestetojn en siajn bekojn, por ke ili baldaŭ povu lerni flugi memstare serĉante manĝaĵon. Grandaj bestoj, kiel elefantoj, perdas la trankvilon de konataj lokoj por ke ili povu moviĝi kun siaj gregoj al regionoj kie ili povos trovi akvon kaj manĝaĵon dum la seka sezono.

Perdi denove estas neeviteble. Sed la problemo ne estas perdi, sed kompreni, akcepti, asimili kaj superi perdojn. Ni havas naturan reagon kontraŭ ĉio tio, rezulton de nia instinkto por

memkonservado; precipe en la infanaĝo, fazo kiam tio, kion ni havas, konfuziĝas kun tio, kio ni estas. En ĉi tiu aĝo, infanoj sentas la perdon de la ĉeesto de sia patrino aŭ de ludilo, interpretante ĝin kiel perfortan forigon de peco de si mem. Konata kvarjara knabino, ekzemple, perdis sian malnovan pluŝurson, esprimon de ŝia "objekta rilato", ludkamaradon, konfidulon kaj amiketon; la tristeco kaŭ-



zis, ke ŝi disvolvis malvarmumon kun raŭkeco post kelkaj horoj, krom igi ŝin malbonhumora. Nur maturiĝante kaj kreskante en vivsperto ŝi komencos kompreni la signifon de ĉi tiu senigo. Akcepti perdon estas plia paŝo en la procezo de maturiĝo. “Per donado oni ricevas”, diras la sperto. Per transdono de nova monbileto, oni ricevas la deziratan glaciaĵon. Per rezigno pri la sekureco de la rando, oni ĝuas la plezuron de la naĝejo. Tamen, ĉi tiu sinteno lanĉi sin en la nekonaton, sperti la novan, sen antaŭjuĝo, estas la rezulto de akcepto, de elekto, de decido, de vera ago de kuraĝo. Estas pli agrable resti en la komforto kaj troprotekto de la hejmo de niaj gepatroj, ol lanĉi nin en la sperton de supervivo sola per nia propra laboro. Akcepti perdojn por kreski estas necesa elekto. Tamen, ne sufiĉas perforte gluti la neeviteblan. Tia kuko povas fariĝi nedigestebla.

Asimili perdon, kiel en la procezo de digestado, estas transformi ĝin en elementon kongruan kun nia maniero esti, estas enkorpiĝi ĝin kiel parton de ni mem. Same kiel la digesta kuko estos prilaborata de sukaj kaj enzimoj, kiuj malkomponas ĝin en asimileblajn substancojn, ekzistas ankaŭ momento kiam la elementoj de perdo komencas konveni en ni kiel esencaj spertoj. La grava afero ne estas tio, kion la vivo

proponas al ni, sed kion ni poste faros per ĝi. Aplikante ĉi tiun penson al nia temo, la fakto ke ni suferas perdojn estas malpli grava ol la sinteno kaj mezuroj kiujn ni prenas kiam ni alfrontas ilin. Estas parto de la programo ke ni spertu frustriĝojn; tamen, ne temas pri tio ke ni senesperigu aŭ deprimiĝu aŭ uzu sensencaĵojn.

Necesas do superi tiujn perdojn, profitante situacion, eĉ kiam ĝi ŝajnis granda katastrofo. La rimarkinda kreinto de Logoterapio (Terapio per Senco), la aŭstra psikiatro Viktor Frankl, dum sia sperto de enfermo en tri naziaj koncentrejoj, malkovris kiom multe homoj povas superi sin mem en dramaj situacioj kaj kiom multe ili kapablas trovi sencon eĉ en sufero kaj morto sub maljustaj kondiĉoj. Multe pli poste, kiam li prelegis en maksimumesekureca malliberejo en Usono, kie li sukcesis transdoni al tiuj viroj senigitaj je sia libereco la ideon ke ĉiam eblas trovi sencon en iu ajn situacio, kiom ajn malespera ĝi ŝajnas, li ricevis plurajn atestojn de ili. Pli ol unu rakontis al li, nekredeble, kiom feliĉaj ili sentis sin tie en malliberejo, ĉar ili malkovris, ke iliaj vivoj havas sencon. Perdoj ankaŭ havas sencon, kiun ni povas malkovri. Almenaŭ ni povas kompreni ilian ĝeneralan signifon: ke ĉiu perdo estas ŝanco kreski.



Imaga interparolo kun filozofoj

En Florenca taverno, kun vino, ironio kaj Makiavelo (ĉ. 1525)

Ĉi-foje mia celloko estis strateto en Florenco, kie mi trovis la filozofon Makiavelo, portantan eluzitan mantelon kaj trinkantan vinon en brua taverno.

Post momento de strangeco, aŭdinte, ke mi estas vizitanto el la estonteco, li ridetis kun diskreta ironio, ŝajne kutima, kaj estis la unua demandi, kvankam jam sciante pri mia intenco intervjui lin.

— El la estonteco? Do mi esperas, ke vi havas pli bonajn demandojn, ol miaj samtempuloj.

— En mia tempo, via nomo estas uzata preskaŭ kiel insulto. “Makiavela” fariĝis sinonimo de malboneco, malvarmecoj, manipulado... Ekzemple, oni kritikas vin pro la diro, ke “la celo pravigas la rimedojn”.

Li ne montriĝis surprizita.

— Ho, jes. Tiu estas la sorto de tiuj, kiuj montras la mondon kia ĝi estas, ne kia ĝi devus esti. Se mi priskribas la kruelecon de regantoj, oni kondamnas min, ne ilin. Tamen mi ne inventis la potencon; mi nur forigis ĝian ŝminkon. Pri tiu frazo, eble oni atribuas ĝin al mi pro erara interpretado de miaj vortoj aŭ pro malica influo de miaj malamikoj. Vi ne trovos ĝin en miaj verkoj.

— Vi parolis pri regantoj kaj potenco. Mia unua demando estus ĝuste pri via plej fama verko, “La Princo”, en kiu vi skribis pri konkero kaj konservado de la potenco. Oni diras, ke vi verkis ĝin por reakiri vian politikan postenon...

Li respondis sen hezito:

— Tion mi ne faris pro unusola motivo. Fakte mi volis provi, ke mi kapablas esti denove utila al la Respubliko,

sed mi ankaŭ intencis prezenti mian teorion pri la politika potenco kaj kontribui al la liberigo de Italio de fremduloj, al la restarigo de ĝia forto sub la gvido de virta gvidanto.

— Kompreneble. Kiel malsama estus la historio se tiuj juĝitaj de siaj posteuloj povus doni sian version de la faktoj... Bone, konsiderante ke ni estas en ĉi tiu drinkejo kaj la homoj ĉirkaŭ ni, mi povas konkludi, ke estas ĝusta la miatempa konkludo pri via emo al drinkado, kartludado, festoj, ĉu ne?



Dirinte tion, mi tuj pentis pro mia aŭdaco kaj timis ricevi akran respondon, tamen la reago de la filozofo trankviligis min. Li kliniĝis al mi kaj flustris en mian orelon:

— Tiuj homoj ĉirkaŭantaj nin – buĉistoj, muelistoj, purigistinoj, drinkuloj, eĉ eble putinoj –, kvankam simpluloj, helpas min kompreni la popolon. Kun ili mi amikiĝas, ridas, amuziĝas, vetludas. En aliaj momentoj, mi ĝuas la kompanion de antikvuloj – Livio, Cicerono, Plutarko –, per kies verkoj mi lernas kiel direkti miajn pensojn kaj vortojn al la regantoj. Tio estas la maniero, kiun mi trovis, por resti vivanta, kiam ĉiuj konsideras min politike mortinta.

Tiam mi demandis pri lia rilato kun la potenculoj kaj lia respondo klarigis, kial li preferis tiutempe la tavernojn kaj la klasikajn librojn. Li respondis tiel:

— Mi estis torturita de la Ŝtato, pro malvera suspekto pri komploto. Ili ligis miajn manojn malantaŭ mian dorson, levis min per ŝnuro alligita al miaj pojn, kaj plurfoje abrupte faligis min, kaŭzante al mi terurajn dolorojn. Do, estimata vizitanto de la estonteco, mi povas diri, ke mi sentis en mia tuta korpo la malbonon, kiun princo kapablas kaŭzi, same kiel mi sentas, ke li, dezirante, povas estigi grandan kaj daŭran bonon.

(Daŭrigota sekvapaĝe)



Ĉar restis nur kelkaj minutoj por mi en tiu vojaĝo tra la tempo, mi decidis ŝanĝi la temon de la konversacio.

— S-ro Makiavelo, vi ankaŭ verkis komediojn. Kial?

Lia larĝa rideto montris, ke plaĉas al li paroli pri tiu nova afero.

— Ĉar politiko estas homa komedio. Kaj ĉar rido instruas pli efike ol moralaj predikoj. Mia teatraĵo “La Mandragoro” estis sukcesa, certe vi scias. Ĝi enhavas ĉion, kion la florencanoj nekonfese ŝatas vidi sur scenejo, kvazaŭ ili rigardas spegulon: adultecon, trompon, malicon...

— Mi povas certigi al vi, ke ne nur la florencanoj... Tamen bedaŭrinde, mia tempo ĉi tie finiĝas, mi devas foriri. Mi petas, ke vi donu al mi du konsilojn por porti al miaj samtempuloj.

— Mi komprenas, stranga vizitanto. La vino ankaŭ finiĝas, ĉio finiĝas pli frue aŭ pli malfrue. Diru al la viroj kaj virinoj de via epoko, ke “tiuj, kiuj preferas iluziojn al faktoj, ĉiam finiĝas kiel regatoj de tiuj, kiuj ne havas iluziojn”. Kaj, ankaŭ, ke “ĉiuj vidas, kia vi ŝajnas esti, sed malmultaj scias, kia vi vere estas”.

José Mauro Progiante

INTERNACIA LITERATURA E-KONKURSO “HRISTO GOROV- HRIMA” – 2026

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj. La konkurso estos por eseo. La temo de la eseo estas: **“MIA LA PLEJ BELA ESPERANTO-REMEMORO”**


Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La verko estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj. La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2026 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio, retadreso:

modest.mihalkov@gmail.com

Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



Demando

En Esperanto estas multaj vortoj, kiuj finiĝas per la grekdevena kvazaŭsufikso *-logi-*: *psikologio*, *astrologio*, *geologio*, kaj aliaj. Ĉu tio signifas, ke oni rajtas uzi ĝin kiel sufikson, libere? Ekzemple: *insektologio*, *librologio*, *hundologio*, *Brazilologio*?

Respondo

En Esperanto, ĉiuj vortoj, inkluzive de afiksoj, povas esti uzataj kaj memstare kaj en kunmetaĵoj. La supre cititaj grekdevenaj vortoj ja uzas afiksojn, sed tiuj ĉi ekzistas memstare nur en la greka, ne en Esperanto. Ekzemple, la vorto *geologio* originas el du grekdevenaj elementoj: *geo-* kaj *logi-*, sed ilia kunmeto produktas la nedisigeblan radikon *geologi-*, kiun oni povas trovi en vortaroj. Aliflanke, neniuj el tiuj du elementoj ekzistas aparte en la oficiala radikaro.

Kelkaj aŭtoroj provas enkonduki kiel vere Esperantajn afiksojn la postafiksojn *-olog-* kaj *-ologi-*. Fakte, dum la preparado de la nova eldono de Plena Ilustrita Vortaro (PIV), tiu punkto estas diskutata. Mia opinio, tiu enkonduko estas superflua eĉ por formi vortojn kiel *insektologio*. Sufiĉas uzi, ekzemple, *insekto-scienco* aŭ *insekto-stud(ad)o*.

Tri opinioj pri la korelativa reformo

Miguel Bento

Esperanto estas artefarita lingvo, sed ĝi evoluadas nature, kaj jam de tre longe ne plu eblas reformi ĝin per ia desupra dekreto. Multaj homoj proponis reformojn, eĉ Zamenhof mem, sed ili ne efektiviĝis... escepte de unu!

En la Unua Libro (1887), niaj tempaj korelativoj (iam, kiam, tiam, ĉiam, neniam) finiĝis per "n" (ian, kian...), kaj do estis homonimaj al la kvalitaj korelativoj (ia, kia...) en la akuzativo. La anstataŭigo de "n" per "m", kiu tiel forigis la ĝenan koincidon, okazis frue, jam en la Dua Libro (1888).

Estas kurioze, ke tri esperantologoj aj gravuloj sufiĉe malsame interpretis tiun unikan okazon. Jen iliaj analizoj:



Gaston Waringhien¹:
Oni eksciis poste, ke tiun plibonigon proponis sro E. von Wahl, tiam studento en Mos-

kvo, kaj fariĝonta la aŭtoro de la lingvo "Occidental". Ke tiel evidentan difekton – la solan kaj ĝenan homonimon en la tiama lingvo – Zamenhof ne rimarkis antaŭ la publikigo, estas io al mi nekomprenebla.

Geraldo Mattos²:

Waringhien miras, ke tiaj homonimaj paroj restis en la lingvo ĝis ĝia publikigo, sed mi kredas, ke ni devus surpriziĝi, ke nur ili troviĝas, se ni konsideras la kolosan laboron faritan dum tiom malgranda tempo kaj postulantan de li samtempan rigardon al la tuta modifata lingvo. Efektive, la sinsekvaj ŝanĝoj ĉiam implicis aliajn permesojn kaj restriktajn, kaj ni devas admiri, ke li ne simple perdis la kapon, kaj rezignis je ĉio.



(Daŭrigota sekvapage)

André Albault³: *En la unua jaro li eĉ metos eraron en la Unua Libro! [...] Prefere ol opinii, ke Zamenhof, kiu tamen ekzerciĝis en la nova lingvo per diversaj tradukoj, simple preterlasis tiujn netaŭgajn formojn, mi estas preta opinii, ke tio estis ruzaĵo lia. Efektive li invitas la unuajn adeptojn de lia lingvo elserĉi la erarojn en la Unua Libro, kaj nepre informi lin, por ke eblu komune perfektigi la novan lingvon; kaj li konkludas, ke post unu jaro estos decido pri ĝia definitiva formo. Eblas do supozi, ke li metis tiun eraron, por ke la novaj adeptoj trovu ĝin: tiel unuflanke li ekhavas teston pri ia grado de atento al*



la lingvo de la trovinto, kaj se tiu postulos alian modifon, li jam povos fidi lin; aliflanke per tio li estas certa sendanĝere modifi la lingvon en almenaŭ unu punkto kaj tiel ankaŭ malakrigi la eventualajn dezirojn al modifoj aŭ reformoj.

Kiu el la tri komentoj ŝajnas al vi pli konvinka? Ĉu vi eble mem havas ankoraŭ kvaran vidpunkton? Mi mem preferas tiun de nia Geraldo Mattos, kiun mi opinias la plej sobra kaj trafa.

1 Lingvo kaj Vivo. 2-a eld.: UEA, 1989, p. 52. (1-a eld.: Stafeto, 1959)

2 La Deveno de Esperanto. Fonto, 1987, p. 96.

3 Naŭ Prelegoj pri la Fundamento. Ittis, 1990. Disponebla ĉe <<http://miresperanto.com/biblioteko/albault/01.htm>>.



FORPASO

La 21-an de februaro 2026 forpasis la esperantistino **Deize Salgado**, emerita instruistino kaj multjara membro de EASP. Ŝi estis asidua partoprenanto en la aktivecoj de la asocio, precipe en ties kulturaj kunvenoj kaj ŝtataj E-kongresoj.

Ni funebras pro la forpaso de nia longtempa amikino Deize kaj kondolencas ŝiajn proksimulojn kaj samideanojn.



Deize Salgado (1941 - 2026)

Virgeco-testo estas konsiderata en Afriko kiel kontraŭhoma turmento

Teksto aperinta en la semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio
Jura Semajno (Februaro 1 : 2026)

La 9-an de marto 2011, Samira Mahmoud kaj Raŝa Abdelrahman partoprenis en manifestacio en la urbo Kairo (Egiptio). Manifestaciantoj postulis novan konstitucion kaj elpostenigon de la egipta ĉefministro. Ambaŭ junulinoj estis haltigitaj de soldatoj kaj unuamomente arestitaj. Samira kaj Raŝa suferis elektrajn malŝargojn kaj insultojn dum la aresto.

Senditaj en milithospitalon kaj tuj senvestigitaj, militkuracisto esploris, antaŭ multaj aliaj soldatoj, iliajn seksorganojn. Poste, ili estis devigitaj subskribi memdeklaron, laŭ kiu ili agnoskis ke ili estis virgaj kaj senedzaj.

Post prezento de plendo kaj 15 ja-roj da pristudado de ĉi tiu kazo, la Afrika Komisiono pri Homaj kaj Popolaj Rajtoj, fondita de la tiama Organizaĵo por Afrika Unueco,

konsideris, ke la deviga seksa esplorado de tiuj egiptaj junulinoj estis malnobliga konduto kaj kontraŭhoma turmento. Krome, la Komisiono deklaris, ke la egipta registaro ne sufiĉe lerte priesploris tiujn okazintaĵojn aŭ juĝis ties respondeculojn.

Ambaŭ junulinoj ricevos kiel kompenson 100.000 egiptajn pundojn (1800 eŭrojn/2100 usonajn dolarojn), pro la faritaj damaĝoj, kaj fizikaj kaj moralaj. Krome, oni postulis al egipta registaro forviŝi tiun fiagadon ĉe milithospitaloj. Temas, do, pri grava decido, pro la fakto ke, laŭ tiu afrika komisiono, deviga virgeco-testo estas konsiderata kiel kontraŭhoma turmento.

Noto de la redaktanto:

La ĉi-supra artikolo, rekte prenita el faka bulteno, estis proponita de nia kunlaboranto João Otávio Veiga Rodrigues. Li opinias, ke indas diskonigi ĝin. Ĝenerale, nia Lampiro enhavas nur originale produktitajn artikolojn kaj tradukojn, kiuj ne estis publikigitaj aliloke. Tamen, la ĉi-supra teksto, kiu aperis en bulteno pri juraj aferoj, koncernas nin ĉiujn. Ni opinias ĝin grava por ĉiu civitano, kiu okupiĝas pri pli sana kaj justa socio. Tial ni decidis fari escepton, ĉi-okaze. Espereble ankau niaj legantoj konsentos.

Gvideco kaj gvidantoj

João Otávio Veiga Rodrigues

Oni ofte komentadas, ke mankas gvidantoj en ĉi tiu konkurencema kaj individuisma socio. Tio eble veras en la ĥaosa socia medio. Sed ne en la Esperantista movado; precipe la brazila Esperantista movado havas nedubeblajn gvidantojn, kiuj per sia ekzemplodona vivsperto montras al la nunaj generacioj la sekuran vojon al nehaltigebla progreso! Kaj unu trajto de tiuj vivspertoj estas la konstanta praktikado de la esperantista idealo de komunikado, paco kaj konstruado de pli bona mondo.

Ni trovas tiajn gvidantojn en la sociaj retoj, en la klasika nacia literaturo, kiu denove retrovas internaciecon pere de Esperanto, kaj eĉ en la elektita niĉo de brazila populara muziko, kie novaj kantistoj ekaperas, resonigante la inspirplenan belecon de nia muzikeco en la harmonia poezio de Esperanto! La elstara gvidanto estas Flávio Fonseca.

Ankaŭ la didaktiko elstaras ĉe bone preparitaj aŭtoroj kun novaj metodoj, kiuj akiras terenon en la sociaj retoj kaj en allogaj materialoj por lingvolernado.

Inter la diversaj kampoj, en kiuj niaj gvidantoj elstaras, troviĝas la Rotaria movado. En ĝi oni kreis Rotarian Klubon de Esperanto, en kiu sociaj projektoj estas diskutataj kaj maturigataj por utili al komunumoj en Tanzanio kaj en la DR Kongo. Tie laboras Úrsula Grattapaglia, Wallace Du Temple, Vicente Paulo Sales, Umberto Canelada, Alberto Emerson Werneck, Ladislau Afonso, John Magessa, Mulele Mbassa, Emma Mathilde Breüninger inter aliuloj.

Estas gvidantoj en nia Esperantista movado, kiuj preskaŭ sole influas tutan urbon, starigante dulingvajn, portugale kaj esperante, stratnomajn ŝildojn en du kvartaloj; instalante dulingvajn informŝildojn en la flughaveno, ĉe bushaltejoj, en la Kultura Domo,

en la Urba Teatro, inter aliaj lokoj; kaj nun ekirante al la eldono de du libroj en la portugala pri Esperanto, krom filmo por festi la 25-jariĝon de la loka Esperantista Asocio. Lia nomo estas Fábio Roberto da Silva

Ni volas emfazi ĉi tie la plej grandan gvidanton de nia Esperantista movado, kiu elstaras je la loka, regiona, nacia kaj internacia niveloj. Lia ĉiama preteco por kreemo, por motivi novajn tradukistojn kaj verkistojn, faras lin unu el niaj plej fruktodonaj instigantoj de la movado por disvastigi Esperanton. Sen li nia movado estus tre malforta aŭ eĉ neekzistanta. Li estas lumturo en ĉi tiu mondo, montrante ke Esperanto ekzistas kaj staras firme, produktante, kreante, plenumante sian rolon, tre necesan por ĉi tiu mondo! Li kreis plurajn videojn en YouTube: *Du minutoj da medicino*,

Esperanto-Novaĵoj, *Lingva provoko*, *Legoklubo Gilbert Ledon*, inter aliaj.

Jen kelkaj biografiaj referencoj pri nia Eminentata Gvidanto: “**PAULO SÉRGIO VIANA** naskiĝis la 8-an de septembro 1948, en Taubaté, subŝtato San-Paŭlo. Li estas kuracisto kun specialigo en Ĝenerala Klinikio, Gastroenterologio kaj Homeopatio. Esperantisto ekde 1962, li havas konstantan partoprenon en la movado por la Internacia Lingvo. Li partoprenis en diversaj esperantistaj organizaĵoj. Li estis premiita en internaciaj literaturaj konkursoj en Esperanto, tradukisto (precipe dediĉita al la tradukado de verkoj de Machado de Assis en Esperanton), kaj regula kunlaboranto de pluraj esperantistaj periodaĵoj, en Brazilo kaj eksterlande.” Li estas membro de la Beleta Akademio de Lorena, kies Patrono estas Profesoro Rui Pereira Brasil.”



easp.org.br/butiko

Negrinjo kaj aliaj noveloj

Monteiro Lobato

Tradukis:
Francisco S. Wechsler | Paulo S. Viana

